

Theodor Storm,
 Oktobra kanto

tradukita de Manfredo Ratislavo

Nebulas, falas foliar’;
 La glason vi plenigu!
 La grizan tagon ni al ni
 Per vino pliheligu!

Se furiozas ĉio ĉi
 Ekstere en la mondo,
 Ne estas detruenda ja,
 La bela tera rondo!

Se tremas ankaŭ via kor’,
 La glasojn vi tintigu!
 La ŝtormo ekster nia dom’
 Min ne malkuraĝigu!

Nebulas, falas foliar’;
 La glason vi plenigu!
 La grizan tagon ni al ni
 Per vino pliheligu!

Aŭtuno regas ĉie, sed
 Atendu nur tempeton!²
 La suno ridos, la printemp’
 Kreskigos ja floretan.

La bluaĵ tagoj ekas nun,
 Ni volas ilin ĝui;
 La tempo fluas, vane ni
 Ne lasu ĝin forflui!

*Traduko de la Germana poemo “Oktoberlied” de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, *1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04).*

Arg-174-351 (2004-02-22 17:52:01)

²aŭ eble:

Atendu nur momenton!
 La suno ridos, la printemp’
 Kalmigos ja la venton.